nia voĉo

madrida esperanto-liceo septembro 2026

## NOVA KURSO EN LA SIDEJO

Ekde la 20-a de oktobro komenciĝos nova ĉeesta kurso de Esperanto, ĉiumarde en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, kiun denove gvidos Javier Vílchez. Bonvolu informi al viaj amikoj, por akiri novajn lernantojn. Ni petis al Javier rakonti pri sia lasta kurso, kaj jen lia informo:

## Raporto pri la kurso de Esperanto 2025-2026

En ĉi tiu finiĝinta somero, oni havis eksterordinaran okazon en Hispanio partopreni ĝis tri grandajn Esperanto-aranĝojn. Antaŭ unu jaro, post kiam mi eksciis pri tiu nekutima triobla okazaĵo en nia lando, mi tuj pensis, ke estos oportune organizi kurson de Esperanto por homoj, kiuj iam interesiĝis pri nia lingvo kaj ŝatus provi ĉeesti kongreson en Hispanio. Sekve, mi proponis min kiel instruanton al HEF.

La kurso komenciĝis la 21-an de oktobro 2025 kaj okazis ĉiumarde je la 18:30 en la sidejo de HEF. Aliĝis 6 lernontoj. Principe, mi elpensis porkomencantan kurson, sed montriĝis, ke komencanto estas nur unu el miaj lernantoj. La aliaj kvin jam havas ioman scion de Esperanto kaj, krome, ĉiu havas malsaman nivelon. Mia kurso estos pli defia ol mi pensis, ĉar mi devos komenci de nulo por la sola komencanto dum mi evitos enuigi la aliajn!

La celo de la kurso estis, ke la lernantoj akiru scion sufiĉan por elturniĝi en Esperanto-renkontiĝo. Mi do klopodis, ke ĉiu scio akirata havu praktikan aplikeblon. En la unuaj lecionoj, ili lernis bazan vortprovizon kaj la preskaŭ tutan gramatikon, kiuj estas necesaj por uzi la lingvon en realaj situacioj. Poste, ju pli ili progresis, des pli paroliga kaj skribiga iĝis la kurso. La lernantoj ekzerciĝis por la kvar lingvaj kompetentecoj: aŭskultkompreno, legkompreno, parolado kaj skribado per iloj kiel sonregistroj, skribaj tekstoj, rolludado kaj verkado. Ekzemple de tiu ekzerciĝo, en la lastaj lecionoj, post ricevo de teksto kun priskribo kaj programo de fikcia Esperanto-kongreso, ili devis plenumi aliĝilon, simuli alvenon kaj akcepton en kongresejon kaj fine verki mesaĝon al amiko pri sia sperto en la kongreso. Tipaj Esperantujaj situacioj, ĉu ne?

Fernando kaj José Luis, du el miaj lernantoj, mem verkis la jenajn tekstetojn, en kiuj ili priskribas siajn spertojn en la kurso:

Fernando: «Saluton! Mi nomiĝas Fernando kaj mi estis komencanto en la kurso de Esperanto ĉe la Hispana Esperanto-Federacio. Mi lernis pri la gramatiko kaj la kulturo, mi parkerigis novajn vortojn, kaj mi ĉefe ŝatis paroli kun miaj samklasanoj en Esperanto. Mi rekomendas la kurson al ĉiuj, kiuj volas lerni tiun fascinan lingvon, kaj mi dankas al Javier, la instruisto, por lia bonega laboro kaj afableco. Ĝis!»

José Luis: «Dum la kursjaro 2025-2026 oni proponis en la sidejo bonan kurson de Esperanto. Mi sekvis la tutan kurson. Ni detale pristudis la esperantan gramatikon, faris multajn gramatikajn ekzercojn, verkis sufiĉe multajn tekstojn kaj partoprenis kelkajn konversaciajn ekzercojn. La etoso inter la lernantoj estis tre bona kaj ĉiuj multe partoprenis. Efektive, ĝi estis tre bona sperto.»

Ĉiuj lernantoj, kiuj ĉeestis la kurson ĝis la fino, sukcese atingis ties celon. Ili do jam scias tute libere helpi sin en Esperanto-evento kaj, eble pli grave, mem ĝui Esperantajn kulturaĵojn. Mi do tre kontentas pri la rezulto.

En 2026-2027 okazos nova kurso ekde la 20-a de oktobro ĉiumarde de la 18:30 ĝis la 20:00 en la sidejo de HEF. Se vi konas iun, kiu ŝatus lerni Esperanton, ne hezitu sciigi lin pri la kurso!

## NOVA ELDONO DE LA KURSOJ EN UNED

Denove ĉijare estos instruata kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), en tri niveloj: A2 (komencantoj), B1 kaj B2 (tiu ĉi nivelo B2 estis proponita unuafoje pasintjare kaj nun denove estas elektebla). La enskribiĝo malfermiĝos baldaŭ, ekde la 8-a de septembro, ĝis la 21-a de oktobro. La kurso mem komenciĝos en novembro.

La kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ni rekomendas ke vi sciigu pri ĝi al viaj amikoj ekster Hispanio, ĉar ankaŭ ili povas enskribiĝi, kaj tiu estas unu el la tre maloftaj kazoj en kiuj oni ricevas universitatan diplomon pro la studado de Esperanto.

Ni ankaŭ povas anonci ke MEL proponos stipendiojn por homoj loĝantaj en la Madrida Komunumo. Kondiĉoj estos baldaŭ diskonigataj.

Vidu ĉiujn informojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

## PARTOPRENO EN INTERNACIAJ KONGRESOJ

Kiel ni anoncis en pasintaj bultenoj, dum la somero okazis pluraj internaciaj kongresoj en Hispanio, kun partopreno de madridanoj: la hispana kongreso meze de julio en Portugalete, la kongreso de SAT en Leono kaj la Internacia Junulara Kongreso (IJK) komence de aŭgusto en Tiana.

Kaj komence de aŭgusto okazis la Universala Kongreso en Graco (Aŭstrio). Madridanoj (vidu foton) deĵoris en la tablo de Hispana E-Federacio dum la Movada Foiro de la Kongreso.




## VENIS AL MADRIDO

Ŝajnas ke Madrido fariĝis altira celo por esperantistoj el la mondo. Krom mallongaj vizitoj al nia urbo, ni povas informi ke nia regiono gastigos eksterlandajn amikojn, kiuj venis por loĝi tie ĉi, ĉu portempe ĉu definitive: Orlando kaj Elsa, el Kubo/ Usono, Marlon ankaŭ el Usono kaj Iván el Kolombio. Bonvenon al ili ĉiuj!

## SEPTEMBRAJ RENKONTIĜOJ

En la monato septembro ni rekomencas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentaĵojn kaj aliajn aktivadojn.

La unuasabata renkontiĝo okazos la 5-an de septembro, je la 18,30 horo, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Ni nun komencos plani aliajn aktivadojn. Kiel ĉiujare, fine de septembro oni festos du datojn tre gravajn: la Internacia Tago de Paco (la 21-an) kaj la Eŭropa Tago de Lingvoj (la 26-an). Estu atenta al la novaĵoj pri pretigotaj eventoj, kaj sendu viajn proponojn se vi havas ideojn.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia reto *Bluesky* vi povas trovi nin ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com